Prezo: 6 €
www.satesperanto.org
Novembro-Decembro 2020 | n-ro 11-12 (1385-1386)

# Sennaciulo

Oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda




SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

# Perantoj

**Aŭstralio** – Franciska Toubale
1 Marne Road, Mount Evelyn, Victoria 3796, Aŭstralio
rete: fran14@bigpond.net.au
**Belgio** – Claude Glady
Rue du Culot, 1, BE-5630 CERFONTAINE
Tel-Fakso-Respondilo: 00-32- (0)71 644916
Rete: cglady@arcadis.be
Bankkonto: 750-6373051-18
IBAN: BE50 7506 3730 5118, BIC: AXABBE22
**Bosnio-Hercegovino** – Fetah Zvirac
Esada Pašalića 6
71000 Sarajevo
Bosna i Hercegovina
rete: fetahzvirac@gmail.com
tel. (poŝa): +387 (0)61 170 094
**Brazilo** – Alex Sousa Santos
Via Principal, P-11, bairro Boa Vista, Green Ville
BR-45027-342 Vitória da Conquista-BA, Brazilo
rete: esperanto1000@gmail.com
tel. (poŝa): +557 7988011780
**Britio** – Arturo Prent
7 Walton Gardens, Hutton, Brentwood, Essex CM13 1EJ, Britio
tel.: +44.1 .277.22.89.62
Nomo: "SAT Sennacieca Asocio Tutmonda"
Bank-kodo: 09 01 56 / Kont-n-ro: 57604003
BIC: ABBYGB2LXXX
IBAN: GB62ABBY09015657604003
rete: ap_esp-sat21@yahoo.co.uk
**Bulgario** – Metodi Markov
Vasil Levski, 20; BG-2700 Blagoevgrad; Bulgario
tel. (fiksa): +359 73882791, (poŝa): +359 879040403
rete: mam1948@abv.bg
IBAN: BG98FINV915010BGN030E5; BIC: FINVBGSF
**Ĉeĥio** – Václav Stibůrek
J. Franka 1731, CZ-25601 Benešov, Ĉeĥio
tel.: +420.737230231, rete: stiburek.v@seznam.cz
IBAN: CZ6620100000002900048738
BIC/SWIFT: FIOBCZPPXXX
**Ĉinio** – Bruno Guy Claude Henry
rete: esperanto.bhenry@yahoo.fr
Bankkonto n-ro 6217857500009246684
SWIFT kodo/BIC: BKCHCNBJ970
Bank of China - Hunan Branch n-ro 593 1, Duan Furong Road (M) Changsha - Hunan - Ĉinio
**Francio** – Barthélémy Maurau
Appartement 120, 3 allée Nathalie SARRAUTE
FR-27000 EVREUX, Francio
rete: barthelemy.maurau@free.fr
**Germanio** – Gary Mickle
Brüsseler Str. 6, DE-13353 Berlin, Germanio
rete: gmickle@nexgo.de

**Hispanio** – Pedro María Sanz Sanz
Apartado 8042, ES-28080 Madrid
rete: pedrosanzsat@gmail.com
Konto: 0182-9465-65-0200272726 (BBVA)
IBAN: ES48 0182 9465 6502 0027 2726
BIC: BBVAESMM
**Hungario** – PETIK Janos (35623)
Hársfa u. 31. I/7
HU-3104 Salgótarján
retadreso: kitepsonaj@gmail.com
**Italio** – Carlo Bourlot
Via Quarello 40, IT-10135 Torino (TO), Italio
rete: carlo.bourlot@gmail.com
Tel.: +39 011 39 70 477; Poŝtel.: +39 333 34 89 280
Poŝtkonto: n-ro 43976158
IBAN: IT88Z0760101000000043976158
BIC: BPPIIRRXXX
**Izraelio** – Jehoŝua Tilleman
97-A Dereh-Akko, IL-26373 Kirjat-Mockin, Izraelio
rete: b48705544@013.net
**Japanio** – Nakamura Daiŝin
Shinagawaku Yashio 5-6-39-1006, JP-140-0003 Tokyo
rete: sat-peranto-japana@googlegroups.com
Poŝtkonto: 00980-9-37624 SAT-Nihon
**Katalunlingvio** – Sandra Vives (KEA)
Apartat 1008, ES-08200 Sabadell, Hispanio
tel.: +34 93 716 36 33, rete: sandra@esperanto.cat
**Koreio** – Jung Hyunsoo (Paz)
4014-2202, 156, Gwangyomaeul-ro, Yeongtong-gu
KR-16510 Suwon-si, Gyeonggi-do
rete: paze23@gmail.com
**Kroatio** – Ivica Ŝĉepanoviĉ (Truto)-poŝte
HR-21414 Gornji Humac (Otok Brac), Kroatio
Tel: +385.21.647.059, Poŝtel: +385.098.182.79.07
rete: ivica.scepanovic1@st.t-com.hr
Bankkonto: 3105505351 otpbanka
IBAN: HR51 2407 0003 1055 0535 1
BIC: OTPVHR2X
**Litovio** – Gražina Opulskienė
Obuoliuko 42, LT89213 Mažeikiai, Litovio
Tel.: +37068736457
rete: grazopul@yahoo.com
Bankkonto: LT347300010001720030
BIC/SWIFT: HABALT22, Swedbank
**Malagasio** – Justine (Lala) Ralalarisoa
Lot IIC - 72 - FD Manjakaray, MG-101
Antananarivo, Malagasio
rete: llrespr@libero.it
IBAN: MG46 0000 4000 0800 7694 2010 112
BIC: BMOIMGMG
**Norvegio** – Cécile Anda
Esperantoveien, LI, NO-4320 Hommersak, Norvegio
rete: cmranda@frisurf.no
**Portugalio** – PAZ Alexandra kaj PRIETO Roger
Joaquim Antonio de Aguiar 100, 1°
PT- 4000-309 PORTO
retadreso: alexandra.paz@gmail.com
retadreso: rogerprieto@gmail.com
Tel.: +351 916 793 285 / +351 915 067 954
Bankkonto: Caixa Geral de Depósitos
Konto: 0748007271900
IBAN: PT50003507480000727190049
BIC/SWIFT: CGDIPTPL

**Rusio** – Nikolao Gudskov
a/k 57, RU-105318 Moskvo, Rusio
rete: nikolao@yandex.ru
**Serbio** – Miomirka Kovačević
Španskih Boraca 32/2, RS-11070 Novi Beograd, Serbio
rete: miomirka.kovacevic@gmail.com
IBAN: RS35160003020011349313
SWIFT/BIC: DBDBRSBG
**Svedio** – Inga Johanson
Stampgatan 60B-1202, SE-411 01 Gotenburgo, Svedio
rete: ishim@hotmail.com aŭ ingajohansson50@gmail.com
Poŝtkonto: Svenska arbetaresperantoförbundet, n-ro 5 31 60-8
IBAN: SE75 9500 0099 6026 0053 1608
BIC: NDEASESS
**Svisio** – Richard Schneller
Rue Charles-Knapp 20, CH-2000 Neuchâtel, Svisio
rete: rischneller@gmail.com
Poŝtkonto n-ro 25-158577-1
**Ukrainio** – Andreo JANKOVSKIJ
str. Lajosha Havro 11-B, ap. 68, UA-04211 KIJV, Ukrainio
rete: andreoespero@gmail.com
telefone: 380 67 99 470 03
**Usono** – Brandon SOWERS
PO Box 52731
GA-30355 Atlanta
rete: bsowers@protonmail.com
**Ĉiuj landoj** – SAT-Sidejo
67 av. Gambetta, FR - 75020 Paris, Francio
rete (ĝenerala retadreso): kontakto@satesperanto.org
rete (pri financaĵoj): financoj@satesperanto.org
Tel.: (+33) 09 53 50 99 58
Poŝtkonto: 1234 22 K, La Banque Postale, Paris
IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: satx-s
Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org

# Kotizoj 2021

| Lando | Jarkotizo | Lando | Jarkotizo |
|---|---|---|---|
| Argentino | 8 € | Kongo, DR | 4 € |
| Aŭstralio | 48 € | Koreio | 36 € |
| Aŭstrio | 48 € | Kroatio | 16 € |
| Barato | 4 € | Kubo | 4 € |
| Belgio | 48 € | Latvio | 12 € |
| Bosnio-Herc. | 8 € | Litovio | 12 € |
| Brazilo | 16 € | Luksemburgio | 48 € |
| Britio | 48 € | Madagaskaro | 4 € |
| Bulgario | 8 € | Makedonio | 8 € |
| Ĉeĥio | 24 € | Malio | 4 € |
| Ĉinio | 8 € | Meksiko | 12 € |
| Danio | 48 € | Mongolio | 4 € |
| Estonio | 16 € | Nederlando | 48 € |
| Finnlando | 48 € | Nepalo | 4 € |
| Francio | 48 € | Norvegio | 48 € |
| Germanio | 48 € | Pollando | 16 € |
| Grekio | 8 € | Portugalio | 24 € |
| Haitio | 4 € | Rumanio | 12 € |
| Hispanio | 36 € | Rusio | 12 € |
| Hungario | 16 € | Serbio | 8 € |
| Irano | 8 € | Slovakio | 16 € |
| Irlando | 48 € | Slovenio | 16 € |
| Islando | 36 € | Svedio | 48 € |
| Israelo | 36 € | Svisio | 48 € |
| Italio | 44 € | Tajvano | 32 € |
| Japanio | 48 € | Turkio | 12 € |
| Kanado | 48 € | Ukrainio | 4 € |
| Kolombio | 8 € | Usono | 48 € |

**DUMVIVA MEMBRECO: 1 300 €**

Por **Francio**, **Germanio**, **Hungario** kaj **Norvegio**, pagu al la SAT-konto en Parizo (vidu detalojn en "**Ĉiuj landoj**") sed nepre informu la peranton kaj la SAT-kasiston pri via pago.

> Por la nemenciitaj landoj la ĉi-jara baza kotizo al SAT estas 4 €. La PK indikos la prezon de la postaj jarkotizoj.

> **Nura abono al *Sennaciulo*: 75% de la kotizprezo en la koncerna lando.** Pagante ĉi sumon, nemembro povas jaraboni *Sennaciulon* + ĝian jaran suplementon *Sennacieca Revuo*.

> Aktiva membro pagas la plenan jarkotizon. Li/ŝi ricevas, perrete kaj surpapere, *Sennaciulon* + ĝian jaran suplementon *Sennacieca Revuo*.

> Help- kaj grup-membroj pagas minimume duoblon de la plena jarkotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.

> Malriĉaj emeritoj, kiuj ne povas pagi plenan jarkotizon, senlaboruloj kaj junuloj (ĝis 25-jaraj) pagas minimume la duonon de la plena jarkotizo, kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.

> Samfamiliano de membro pagas la duonon de la jarkotizo. Li/ŝi ĝuas la samajn rajtojn (ekzemple dum kongreso) sed ne ricevas la asocian organon nek la SAT-Adresaron.


*Sennaciulo*
Organe officiel de SAT / Oficiala organo de SAT

**Siège de SAT / Asocia sidejo de SAT**
67 avenue Gambetta,
FR-75020 Paris, Francio
*Retadreso:* kontakto@satesperanto.org
*Retejo:* http://satesperanto.org
*Tel.:* (+33) 09 53 50 99 58
*Poŝtkonto:*
1234-22 K, Paris
IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: satx-s
Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org

**Plenum-Komitato de SAT**
*Prezidanto:* Vinko Markovo
*Vic-prezidanto:* Pedro Sanz
*Sekretario:* Diana Riŝar
*Kasisto:* Bruno Henry
*Vic-kasisto kaj eldonestro:* Guy Cavalier
*Ceteraj membroj:* Paz (Jung Hyunsoo), Dieter Rooke, Dominiko Simeone
*Reprezantoj de SAT en la LEA-Komitato:* Paz kaj Dieter Rooke

**Sennaciulo**
*Redaktoskipa kunordiganto:* Vinko Markovo
*Vic-kunordiganto:* Pedro Sanz
*Enpaĝiganto:* Nicolas Raymond
*Ceteraj redaktantoj:* José Antonio del Barrio, Riccardo Lamperti, Masako Tahira (Masakato), Gary Mickle, Rob Moerbeek, Grazina Opulskiene, Marcel Redoulez, José María Salguero (Kani), Richard Schneller, Serĝo Sir' kaj Franciska Toubale
*Kontribuojn sendu elektronike al:*
sennaciulo.redaktejo@gmail.com
*aŭ paperpoŝte al*:
SAT-Amikaro
132-134 boulevard Vincent Auriol
FR-75013 Paris, Francio
*Pri financaj aferoj sendu al:*
financoj@satesperanto.org
*Libromendojn sendu al:*
libroservo@sat-amikaro.org
*Librajn eldonproponojn sendu al:*
pimskrabo@yahoo.fr
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas.
Imprimé par/*Presita de:*
TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.
Aperas dumonate - Bimestriel.
Directeur de la publication: Guy Cavalier
Abonnement annuel/*jara abono:*
France 36 €
Autres pays/*aliaj landoj:* petu la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-centro.
Dépot légal à la date de parution:
N° CPPAP 05 25 G 86567

## ✍ REDAKTANGULO ✍

Karaj legantoj,

Jen numero denove redaktita en momento, kiam la refortiĝo de la kronvirusa pandemio devigis plej multajn loĝantojn de la norda hemisfero draste redukti siajn sociajn kontaktojn. Kvankam la temo provizore malaperis el la kolumnoj de *Sennaciulo*, ĝi daŭre havas rektan influon al la SAT-vivo. Interalie, malfacilas nun prognozi, ĉu efektive eblos al kelkaj el ni fizike renkontiĝi en Bjalistoko inter la 25a de julio kaj la 1a de aŭgusto 2021, aŭ ĉu tiun semajnon interesiĝantoj devos pasigi nur ĉe komputilo. Ambaŭkaze, ĉiuokaze, necesos kontribuoj al la programo, kaj tion ĉiuj estas bonvenaj proponi jam nun al la organizantoj (programo@sat.bialystok.pl).

La nuna numero malfermiĝas per historia ĉefartikolo, omaĝe al la centjariĝo de nia plej malnova kamarado, Eduardo Vivancos. Ne temas pri represo. La artikolon Eduardo proponis al *Sennaciulo* en 1968, sed ĝi finfine publikiĝis nur antaŭ dekkvino da jaroj en la retejo de SATeH.

Kiel kutime, la ĉi-numeraj tekstoj esperebe vekos ĉe vi emon reagi. Tion farante, indas memori la vortojn de la ĵus forpasinta Antonio Marco Botella, en sia enkonduko al *Laboristaj kronikoj*: "*Mi, laŭ SAT-eca kutimo, povas kritiki iun ajn k-don pri iu konkreta opinio aŭ ago, sed tio tute ne signifas, ke mi ne sentas min solidara kun li/ŝi en aliaj aspektoj de la socia aŭ politika linio de tiu sama homo, kies eblan eraron mi publike denuncas. Mia celo ĉiam estas konstrua kaj honesta.*"

En tiu ĉi numero, kiun vi ricevos kune kun *Sennacieca Revuo*, aperas prezento de la kandidatoj al la PK kaj al la Ĝenerala Konsilantaro. Bonvolu ne forgesi baloti por viaj plej ŝatataj.

Agrablan kaj partopren-instigan legadon deziras al vi

La redaktoskipo

**Frontpaĝa bildo:**

Panelo utiligata dum karavano en Hokkajdo (Japanio) kontraŭ atomenergio (paĝo 30).

# Enhavo


**Historio**
4 Kelkaj konsideroj pri la 53-a Universala Kongreso de Esperanto (UEA)
6 Memore al Herzen

**Tra la mondo : Eŭropo**
11 Eĉ en malgranda urbo estas io por viziti!
13 Amo kaj respondeco
15 Ĝi estas popola festo

**Tra la mondo : Azio**
17 75-jariĝo de la fino de la Okinava Batalo

**Tra la mondo : Mezoriento**
21 Irako ne forgesis la Islaman Ŝtaton
23 "Eŭropo simulas blindulon antaŭ la krimoj de Turkio"
26 Viola rifuĝejo en Kurdio
28 En la lasta jaro Turkio eloficigis 40 kurdajn urbestrojn de la Partio Demokrata de la Popolo
29 Erdogan komencis konstrui setlejojn en Roĵavo por arabaj rifuĝintoj

**Medio**
30 Karavano kontraŭ atomcentraloj en Hokkajdo (Japanio)
31 Fundamenta kritiko

**Beletro**
31 Hispana somero (sekvo)
33 Semo de matenruĝoj
37 Alia vojo
47 Poemoj de Ángel Arquillos

**Intelekta memdefendo**
39 Respondo al demando
40 Civitana interkonsiliĝo

**SAT-anoj aktivas**
40 Sub la sankta signo de la svisa standardo
41 SAT-heredaĵo: La 3000-libra biblioteko de la muelejo

**Tra Esperantio**
43 Historio de la Akademio de Esperanto
44 Omaĝe al Hector Hodler (1887-1920)

**Nekrologo**
45 HUĜIMOTO Tacuo
45 SAWAYA Yuuiti

**El la SAT-Administrejo**
46 Kandidatoj por la Plenum-Komitato de SAT, mandatperiodo 2021-2024



PRI LA ENHAVO DE LA ARTIKOLOJ RESPONDECAS LA AŬTOROJ MEM. RICEVITAJN MANUSKRIPTOJN NI NE RESENDAS. KONTRIBUOJN SENDU AL:
**SENNACIULO.REDAKTEJO@GMAIL.COM**

### 100-jariĝo de Eduardo Vivancos

# Kelkaj konsideroj pri la 53-a Universala Kongreso de Esperanto (UEA)

La 53-a Universala Kongreso okazos ĉi jare en Madrido. La Alta Protektanto de la Kongreso estos Generalo Franco. Kiam unuafoje mi legis supremenciitan novaĵon mi estis tiom ŝokita ke mi kredis esti viktimo de terursonĝo. Mi neniam povis supozi ke la vorto Esperanto kaj la nomo de faŝista Franco povus esti iamaniere asociitaj. La tempo ne estas tiom malproksima por ke la esperantistoj forgesu kiu estas Franco; ke ili forgesu la krimojn pri kiuj li kulpas, krimoj kontraŭ libereco, krimoj kontraŭ demokratio kaj ankaŭ krimoj kontraŭ la Esperanta idealo.

Mi ne forgesis; mi neniam forgesos la terurajn jarojn de la hispana milito kiam Franco, dank' al la helpo de Hitler kaj Mussolini ribelis kontraŭ hispana demokratio, La lukto daŭris tri jarojn. En la teritorio okupita de la faŝistoj la esperanto-movado tute ĉesis ekzisti; en Zaragozo, Logronjo kaj aliaj urboj multaj esperantistoj perdis sian liberon, kelkaj perdis sian vivon. Kiam en februaro de la jaro 1937 la faŝistoj okupis Malago-n, miloj da personoj estis mortpafitaj, ĉar ili estis membroj de laboristaj sindikatoj, demokrataj asocioj kaj de la loka Esperanto-klubo. En 1939 la tuta lando estis okupita de la faŝistoj, kaj dum pluraj jaroj Esperanto estis duonleĝa, ĉar oni konsideris esperantistojn kiel "danĝerajn" internaciistojn, malamikojn de la "sanktaj" tradicioj de la patrio. La esperantistoj kiuj eskapis la persekuton ne kuraĝis surmeti la verdan stelon, kaj la Esperanto-movado estis nula. Jaroj pasis kaj iom post iom esperantistoj komencis krei grupojn en kelkaj urboj, kaj fine hispanan asocion. Mi multe ĝojas pri la renaskiĝo de la Esperanto-movado, kaj deziregas ke ĝi prosperu, sed kion mi neniel povas akcepti estas la fakto ke Franco, kies manoj estas makulitaj per la sango de multaj el niaj samideanoj, estu honorata por prezidi Esperanto-kongreson. Mi scias ke estas kutimo inviti la ŝtatestrojn por honore prezidi UEA-kongresojn. Oni povas ŝati aŭ ne ŝati la kutimon, sed kiam la koncerna ŝtatestro estas Franco, la kutimo estas netolerebla; mi eĉ povas diri ke ĝi estas naŭziga.



**Marcelo Fraga Iribarne (frato de Manuel Fraga Iribarne [*]) bonvenigas la kongresanojn.**

Oni povas pretendi ke tiu kongreso multe helpos la hispanan Esperanto-movadon. Grava eraro. Franco estas profunde malamata de la plejmulto da hispanoj; la nomo de la diktatoro en la kongreso kaŭzos malfavoran impreson kaj la aŭreolo de idealismo kiu ĉirkaŭas la vorton Esperanto certe malheliĝos. La nomo de Franco estos makulo en la Esperanto-movado. Mi scias ke multaj esperantistoj, hispanaj aŭ ne hispanaj, malaprobas la okazigon de tiu kongreso en la nunaj cirkonstancoj, ĉar Franco estas la malamiko de ĉiuj humanismaj ideoj. Ekde la faŝista ribelo ĉiuj hispanaj liberalaj homoj opoziciis lin. Mi menciu la nomon de kolonelo Julio Mangada, prezidento de la Hispana Esperanto-Asocio en 1936; Mangada estis unu el la unuaj kiuj kontraŭstaris la kriman ribelon de Franco. Mi honoru la nomon de eminenta esperantisto Jaume Grau Casas, fidela membro de UEA, Lingva Komitatano, aŭtoro de *Amaj Poemoj*, *Kataluna Antologio*, *Poemo de Amo kaj Doloro* kaj multaj aliaj verkoj. Grau Casas suferis dum pluraj jaroj en koncentrejoj kaj fine mortis en Valencio, tute seniluziigita, preskaŭ forgesita de ĉiuj. Dum en koncentrejo ni estis kune

dum pluraj monatoj en la sama barako. Ni ĉiam parolis en Esperanto kaj li ofte menciis sian fidon en estonta triumfanta Esperanto-movado en libera Hispanio, sen faŝismo kaj sen Franco. Kiel li povus imagi ke kelkajn jarojn poste la nomo de Franco estus uzita por anonci Esperanto-kongreson?

Kial do Franco toleras la Esperanto-movado kaj eĉ akceptas esti la "protektanto" de kongreso? Por tiuj kiuj vere konas la politikajn manovrojn de la hispana diktatoro, tio ne estas surprizo. Ĝis la jaro 1945 Franco deklaris publike multfoje sian malŝaton por demokratio kaj eĉ sendis "volontulojn" en la Blua Divizio, sub nazia uniformo, por lukti flanke de la Hitlera Armeo. En tiu epoko li ŝatis fanfaroni pri sia faŝisteco. Jen kion deklaris faŝista gravulo A. Goicoechea, intima kunlaboranto de Franco, al ĵurnalisto de franca gazeto L'Echo de Paris: "Nia programo konsistas el tuteca kaj aŭtoritateca ŝtato. Korporacioj sen libero. Ja ni estas profunde naciistoj kaj pasiaj malamikoj de demokrataj institucioj."

Sed Hitler estis venkita. La reĝimo de Franco estis izolita kaj praktike kondamnita. La 9-an de februaro de 1946, la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj kunveninta en San Francisco, Usono, deklaris: "Laŭ sia deveno, naturo, strukturo kaj konduto, la registaro de Franco estas faŝista reĝimo kopiita de Hitlera Germanio kaj Mussolina Italio, kaj grandparte establita dank' al la helpo kiun tiuj landoj donis al li" kaj poste la deklaracio aldonas: "la faŝista reĝimo de Franco ne povas iamaniere reprezenti la hispanan popolon". Tiam komenciĝis longa kaj konstanta filudo de Franco. La faŝista diktatoro iĝis "demokratulo". Li parolis pri religia libero, pri asocia libero, pri preslibero. Li volis impresi alilandajn kancelariojn sed la hispana popolo daŭre estis kaj estas subpremata. La Universala Kongreso de Esperanto utilos al Franco kiel pruvo de "toleremo kaj demokratemo". Franco profitos de la kongreso, sed la Esperanto-movado, ne! En tiu kazo Esperanto estos utiligata por pravigi la trompon de senskrupula faŝisto. Kial do UEA pretiĝas al tiu trompo? Ĉu ne estas en UEA personoj politike konsciaj por eviti tian fian agon kontraŭ homa indeco?

Amara ironio; la jaro 1968 estas la Jaro de la Homaj Rajtoj. La LKK organizos foto-konkursojn kies temo estos citaĵo el la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Mi proponas ke la partoprenontoj sendu fotografaĵojn montrante manifestaciojn de hispanaj laboristoj kaj studentoj postulante la rajton havi proprajn laborsindikatojn kaj studentajn organizaĵojn; fotografaĵojn montrante kiel la policanoj de Franco sovaĝe atakas kaj arestas la manifestantojn; fotografaĵojn montrante kiel vivas la kamparanoj en Andaluzio kaj en Ekstremaduro. Sciu ke homaj rajtoj ne ekzistas en Hispanio; sciu ke ĉiutage okazas protestoj flanke de laboristoj, studentoj, intelektuloj kaj eĉ pastroj; sciu ke en la karceroj oni torturas kiel en la epoko de la Inkvizicio; sciu ke inter la enkarcerigitoj ankaŭ troviĝas esperantistoj, kiel ekzemple nia samideanino Alicia Mur kies kulpo estis partopreni en asocio ne tolerata de la faŝista reĝimo de Franco.

Mi sugestas ke tiuj, kiuj partoprenos la kongreson, ne vizitu nur la belajn konstruaĵojn de Madrido, la Valon de la Falintoj kaj la porturistajn luksajn marbordojn. Mi sugestas ke ili kontaktu la popolon kiu suferas kaj kiu esperas ke iam libereco brilos denove.


Mi timas ke tiu ĉi artikolo estas jam tro longa, kaj tamen restas multo por diri. Mi klopodis esti objektiva sed mi sentis ke mi havis la devon denunci la krimojn de la "protektanto" de la ĉi-jara Universala Kongreso kaj energie protesti kontraŭ la decido okazigi tiun kongreson sub la ŝildo de faŝista diktatoro.

Eduardo Vivancos (21519)

*Februaro 1968*

**Noto:**

[*] Plej grava politikisto de la reĝimo de Franco (NdR)




**Generalo Franco - honora prezidanto de la 53-a UK**